



BULTENO  
DE

Malaga  
Esperanto  
Grupo

# La Ĝenaĉero

n-ro 3

JULIO - AŬGUSTO

Jaro 1984a

Jen la tria numero de nia bulteno. Inter la antaŭa kaj ĉi tiu ne pasis multa tempo sed okazis kelkaj interesaj aferoj. Rimarkindas la 2a Andaluza Kongreso, kies ĉefajn konkludojn vi povos legi en la koncerna sekcio de ĉi tiu numero.

Nia regiona Kongreso jam pasis kaj ĝia sekcio ne plu aperos. Anstataŭe, oni starigas Sciencan Paĝon farotan de tiuj, kiuj deziras partopreni per siaj artikoloj. Oni postulas nur ke la temo estos scienca sed la kriterio estas tre ampleksa. Do, jen kelkaj temoj: Medicino, Biologio, Jogo, Meditado, Kemio, Elektrotekniko, Lingvistiko, Astronomio, k.t.p.

Pri la ceteraj artikoloj, ni rimarkigas la kunlaboraĵon, kiu ja estas vera scienca laboro kaj ke ni komencas publikigi ankaŭ la biografiojn (postulatajn por la ekzameno de ILEI) de kelkaj el la ĉefaj esperantistoj de nia Movado. Ni esperas ke tio helpos al la pretigintoj de ĉi ekzamenoj.

Dezirante ke la enhavo de ĉi tiu numero plaĉu al vi, salutas vin ĉiujn

La Redakcio

# NIA GRUPO

Aŭgusto estis monato tre produktiva en ĉiuj sencoj: oni laboris multe kaj ankaŭ oni ellaboris interesajn agadplanojn por la venontaj monatoj.

Kiel vi scias, ni organizis la 2an Andaluzan Kongreson, okazinta dum ĉi monato. Interese estas koni la konkludojn. Oni decidis ke la sidejo de AEU estos Malago. Kelkaj el niaj membroj respondecos pri koncernaj fakoj. Samideano Andrés estas la prezidanto de la Federacio; samideano Julio estas la sekretario kaj samideano Vicente estas la kasisto. Niajn plej bonajn dezirojn por ili.

Finfine, nia grupo organiziĝas. Konsentite de kelkaj membroj niaj gejunuloj prizorgos la direktadon de la klubo. Tiamaniere, ni starigos prezidanton, kasiston, respondeculojn pri la biblioteko, pri festarangadoj, ktp. Oni informos pli en ĝenerala kunveno.

La venontan 4an de Septembro komenciĝos Elementa Kurso de Esperanto. La aliĝo al ĉi tiu kurso kostos 1500 pesetojn kaj tiu prezo inkludas la materialon, tio estas, libron kaj vortaron.

Kaj la 5an komenciĝos alia kurso, sed ĉi tiu estos por tiuj, kiuj jam konas iom la lingvon. Rajtas partopreni tiun kurson ĉiuj membroj de nia grupo, tio estas, tiuj, kiuj pagas siajn kotizojn. Oni agos laŭ la libro "Paŝoj al Plenaj Posedoj" aĉetebla el HEF. Por tiuj personoj, kiuj ne konas la libron, ni diros ke, se iu ne povas komenci la 5an, tio ne gravas ĉar la preparolita libro konzistas el diversaj "paŝoj" kiujn oni povas lerni sendepende. Oni sciigas ankaŭ ke, kompreneble, la sola laborlingvo uzeta estos Esperanto. Per tia kurso ni celas ke la partoprenantoj altigu sian lingvoscion gramatike kaj parole.

Ĝis la venonta numero! La Grupo.

---

Pri la enhavo de la artikoloj, respondecas la aŭtoroj mem.

---

# LA MOVADO

Kiel vi certe scias, en nia urbo disvolviĝis la kunsidoj de la ĉi-jara 2a Andaluzia Kongreso de E-o. Ĉiuj kunvenoj plenis de diskutoj, jen akraj, jen mildaj, kio ĵetis lumon sur niajn latentajn fortojn. Tiam ekvigliĝon de nia movado en Andaluzio ni devas ne preteratenti, sed, tute male, bonvenigi kaj stimuli. "Ni fosu nian sulkon", ni kutimas diri celante, ke ĉiu laboru laŭ siaj ebloj en sia fako por la antaŭeniro de nia afero. Sed bazo ne malhavebla estas minimuma organiziĝo por unuigi fortojn. Ni konu do la konkludojn kaj rezoluciojn de nia ekfloranta samideanaro en la ĵus pasinta kongreso, kie ili (kaj ni) deplojis siajn (niajn) ideojn por pli efika agado. Jen parto de ili:

## 1.- Pri AEU

-Ĉiu, kiu tion deziras, povos aparteni al ĝi.

-Kotizoj: Kun gazeto 500 ptoj

Sen " 200 ptoj

Gazeto sen membreco 300 ptoj

-Aliĝo al HEF kaj al UEA

## 2.- Pri "Gazeto Andaluzia"

-Por la venonta jaro la kotizo altiĝos al 300 ptoj (ĉi nun, tio estis 200 ptoj).

-La enhavo estos tute Esperant-lingva; oni tamen aldonas ĉiam hispanlingvan foli(ar)on disigeblan.

-Favori "Gazeto Andaluzia"-n prefere ol la lokajn aŭ grupajn revuojn/gazetojn.

-Kordovo plubresos "Gazeto Andaluzia"-n, sed la grupoj devigas sendi la originalojn pretaj

-"Gazeto Andaluzia" estos oficiala organo de AEU.

## 3.- Pri venontaj agadoj por la disvastigo de E-o en Andaluzio

-Daŭrigo de la sistemo elektita dum la pasinta jaro.

Ĉiu urbo kun E-grupo prizorgu Esperantan disvastigon en la du pli proksimaj provincoj.

(Daŭrigota)

Sciigis Rikardo

# ILEI Paĝoj

Ekde ĉi tiu numero ni publikigos la biografiojn de la plej elstaraj esperantistoj de nia Movado en la fako de Literaturo.

EROŜENKO, Vasilij

Rusa blindulo. Li helpe de Internacia Lingvo vojaĝis tra la mondo. Konkrete li loĝis en Britio, Japanio, Siamo, Hindujo, kaj Ĉinio (krom en Rusio, kompreneble). En 1912, li entreprenis sian unuan E-vojaĝon (ĉi-foje, al Britlando) kie li lernis en Instituto por blinduloj. Studis masaĝon ĉe blindula lernejo de Tokio kien li venis en printempo de 1915. Post entuziasme proponi tie Esperanton, li translokiĝis Siamon kaj tie fondis problindulan lernejon. Dum li veturis trans Hindujo, li estis malliberigita kaj poste elpelita kiel rusa bolŝeviko. Denove, en 1919, li forkuris al Japanio (tra Ŝanĥajo). Scipovante japanan lingvon, Eroŝenko verkis en tiu orienta lingvo multajn rakontojn por geknaboj kaj tiel famiĝis inter la progresema japana literaturistaro. Poste, la lan de Majo de 1921a, ĉar partoprenis en laborista demonstracio kaj en kongreso de japana socialista federacio, Eroŝenko estis arestita kaj elpelita.

Estis tiam, kiam li venis en Ĉinion. Ĉi tie, en 1922a prelegis lecionojn pri rusa literaturo kaj aliaj temoj en Pekina Universitato kaj edukista kolegio por virinoj.

Disde liaj verkoj ni povas mencii la jenajn:

"Turo por fali"

"Unu Paĝeto el mia Lerneja Vivo" (1923)

"Ĝemo de unu Soleca Animo"

La serio kompilita de Mine Yositaka pri kaj de Eroŝenko:

"Lumo kaj Ombro"

"Malvasta Kaĝo"

"Stranga Kato"

"La Tundro Ĝemas"

Pri "La Tundro Ĝemas" komentas A. Fernandez en "Heroldo de E-o": "Tiu ĉi libreto enhavas aŭtobiografiajn prozaĵojn. Inter ili impresas la skizo "la destinita vivi" kaj la potenca rakonto "la trimova ŝakproblemo" kiu lasta rilatas al eventoj de la "granda purigo" sub Stalino. La kompilinto (Mine Yositaka) aldonas ankaŭ skizon pri la vivo de Eroŝenko kaj abunde provizas

la tuton per bibliografiaj kaj klarigaj notoj (...)"

Eroŝenko estas poeto, eĉ en prozo. Li havas precizan animon kiun li ne povas kaŝi, eĉ en artikolo pri problemoj de internaciaj rilatoj. Li verkas tre romantike, tre patose.

En 1923, ĉe la Universala Kongreso de Nürnberg li gajnis unuan premion por la plej bona deklaro en Esperanto, per sia originala poemo "Ciganino". La verkoj de Eroŝenko ĉarmas per sia simpla, sincera, iom naiva kaj sentimentala enhavo.

Eroŝenko multe propagandis propagandon en la Sovetunia Societo de Blinduloj en Moskvo.

En 1923, nia aŭtoro foriris al sia patrolando.

### GROSJEAN-MAUPIN, Emile

Licea profesoro. Naskiĝis la 19an de Februaro de 1863 en Nancy kaj mortis en 1933. Lia pseŭdonimo estis "Fakulo". Emerita Direktoro de la ŝtata altlernejo por geblinduloj en Paris Lernis E-on en 1906. Dum lia tuta vivo okupiĝis preskaŭ ekvivalente pri lingvaj demandoj. Li recenzis abunde kaj verkis multajn artikolojn per gravaj gazetoj kiaj "La Revuo", "Heroldo", "Literatura Mondo" kaj aliaj. Konstanta redaktoro de la revuo "Franca Esperantisto" de 1908 ĝis 1921, tio estas, de ĝia naskiĝo ĝis ĝia malapero. Grosjean-Maupin ĉiam rimarkis, ke la esenca kaj plej necesa eco de E-o estas la facileco kaj ke, ofte, la vortaro plidikiĝas ne riĉe sed balaste. Cart, en sia libro "Vortoj de Profesoro Cart", diris nelonge antaŭ sia morto: "E, tiu ĉi kvazaŭtestamento mi deziras enskribi ankaŭ la nomon de mia kolego profesoro Grosjean-Maupin, kiu de la komenco de mia presidanteco pli ol iu ajn faciligis mian akademian agadon".

Ano de Lingva Komitato en 1909, akademiano en 1920, li rapide fariĝis Direktoro de la "Komuna Vortaro" kaj alportis la sperton de siaj leksikologiaj laboroj. Li starigis la liston de la novaj vortoj oficialigotaj kaj redaktis la "Oficiala Klasika Libro".

Liaj precipaj verkoj estas la tre kompletaj kaj detalaj vortaroj Esperanto-Franca (1910) kaj Franca-Esperanto (1913). "Plena Vortaro de Esperanto" (1930), nur esperante redaktita, kiu markas gravan daton en la leksikologio de la Internacia Lingvo, estis direktata de li.

(Daŭrigota)

# LETEROJ AL LA DIREKTORO

Estimata Redaktoro:

Notu unue mian gratulon al la grupo pro la inter aliaj interesaj agadoj eldonado de la revuo. Kaj ŝefe, al ĝia redaktoro. Certe redakti revuon ne estas unuopula tasko.

Pri la enhavo de la revuo mi opinias ke ĝi adekvatas al la disponeblaj fortoj. Eble iom tro longas kelkaj artikoloj, kio, se konsideri la amplekson de la revuo, povus esti misa. Tamen agnoskendas, ke gravaj temoj ne povas pritraktiĝi en nur pluraj linioj. Tre interesaj mi trovas la sekciojn kun kurtaj informoj kaj novaĵoj, tiuj pri nia ŝi-tiea movado kaj tiuj ĝeneralaj aŭ tiritaj el aliaj revuoj. Rimarkeblas la labore farata por atingi ĝin. Denove gratulon.

La lingvaĵo de la revuo ete lamas. Estus bone kontrolegi ĝin per bona konanto de la lingvo por eviti erarojn tre facile eviteblajn, kiel "literara" vic'al "literatura", ktp.

Resume, la revuo estas bona provo kunligi la niaurbajn esperantistojn, sed oni atentu ĝian zigzagan aperon kaj klopodu reguligi ĝin.

María José Quesada Mejías

Dankon al samideanino M<sup>o</sup> José pro ŝia letero. Ni esperas viajn opiniojn. Antaŭen!

---

BONVOLU LEGI ATENTE      BONVOLU LEGI ATENTE

Okaze de Ĝenerala Grupkunveno, oni petas de ĝiuj partoprenon la venontan 28an de Septembro, ĉar oni pritaktos inter aliajn, jenajn temojn:

- Elektadon de Prezidanto, Sekretario, Kasisto, respondeculoj pri Biblioteko kaj Revuo.
- Membrecon.
- Ekonomiajn diversajojn.

Bonvolu ŝeesti. Dankon.

# JUNULARA ANGULO

## LA SENLABORECO KAJ LA STUDENTOJ

Paroli pri ĉi tiu temo en tiel malmultaj linioj ne estas facile, ĉar mi riskas distemiĝi.

La senlaboreco, tia danĝero kiu atendas la gejunulojn kiam ili finas siajn studojn, estas produkto de la nuntempa socio kaj ĝia senĉesa meĥanizo.

Kiam junul(in)o decidas studi tiun aŭ tiun alian studaron, li aŭ ŝi devas unue pripensi la eblecojn trovi laborpostenon post ties fino. Tiu ĉi alvenas ne antaŭ ol kvin jaroj, ĝenerale. Tio ja povas ŝajni troa tempo sed ankoraŭ oni devas aldoni, ke la Hispana Kleriga Sistemo ne stimulas la studentojn dum tiuj kvin jaroj. Pro tio, ofte oni forlasas la studadon antaŭ ol ĝia fino alvenas. Sed tiuj, kiuj, post la fino de la studaro, finfine atingas sian diplomon, troviĝas antaŭ reala mondo. Hodiaŭ titolo ne malfermas ĉiujn pordojn, kontraŭe al tio, kio okazis antaŭ 30 aŭ 20 jaroj. Post la diplomitiĝo, kelkaj licenciuoj trovas laborpostenon sed, en plej multaj kazoj, post malagraba konkursa ekzameno.

Kaj, ĉu se oni ne sukcesas? Se tio okazas, restas nur du eblecoj: Rezignacii trovi ian ajn laborpostenon, ne rilatan al la studaro lernita aŭ, la plej grava, ne labori. Eĉ la unua solvo preskaŭ ne eblas hodiaŭ en nia socio. Do, tio volas diri ke la plimulto da gestudentoj devas petigi sin dum kvin jaroj por la senlaboreco. Ni vidu nun kelkajn ciferojn:

Kalkulita Senlaboreco laŭ Aĝoj kaj Seksoj en Hispanio

1982

1983

Aĝoj kaj Sekso	Miloj	%	Miloj	%
+Malpli-ol-19jaraĵ	467'6	100'00	503'8	100'00
Viroj	250'5	53'57	263'5	52'30
Virinoj	217'1	46'43	240'3	47'70
+De 20 ĝis 24 jaroj	443'0	100'00	551'6	100'00
Viroj	257'6	58'15	303'0	54'93
Virinoj	185'4	41'85	248'6	45'07

(Daŭrigota)

Rafael

# SCIENCA PAĜO

## LA AKVO

La vivo komencis disvolviĝante en la akvo, vivas ankoraŭ en ĝi kaj bezonas ĝin kiel bazo de la bioĥemiaj ŝanĝoj kiuj konsistigas ĝin. Ni mem estas 65% da akvo kaj ĝi estas absolute necesa por niaj hejmaj agrikulturaj kaj industriaj bezonoj. Estis tempo kiam la akvo de riveroj, maroj kaj fontoj ŝajnis neelĉerpebla bono. Nuntempe ĝi ne plu estas tiel.

La tuta kvanto de akvo ekzistanta en la tero estas taksita je 1.250 milionoj da km<sup>3</sup>. Tiu ĉi akvo estas portita de la gravito al la plej malaltaj zonoj de la tera supraĵo, formante la oceanojn kiuj kovras la 70% de tiu surfaco.

La akvo estas la daŭra posedo de nia planedo. Ekzistas pluveto de molekuloj de akvo kiu tra komplikitaj procesoj perdigas en la ekstera spaco, sed estus necese multaj centoj da milionoj da jaroj por ke tiu perdo estos perceptebla. Ankaŭ konsumiĝas iom da akvo pro diversaj ŝanĝoj geologaj, ĥemiaj kaj biologaj, kelkfoje per kaj aliffoje sen la homa agado. Tamen, la akvo estas ĉiam la sama kaj ĝi respondas al daŭra ciklo.

La suna varmo eltiras akvon el la supraĵo de la oceano per elvaporigo, distilante ĝin, precipe en la regionoj vermaj tropikaj, kaj pro tio, grandaj kvantoj da vaporo de akvo enfluas en la atmosferon. Tiu ĉi nur enhavas limigitan vaporon de akvo, kaj la malvarma aero retenas malpli da ol la varma aero. Pro tio, nur parto senvalora kvante da akvo troviĝas vaporforme en la atmosfero, sed ĝi havas grandan gravecon kiel faktoro regulita de la klimato.

Kiam la vaporo de akvo leviĝas al la altaj zonoj malvarmaj de la atmosfero aŭ ĝi delokiĝas al la Nordo aŭ al la Sudo, malproksime de la tropikaj kaj al la regionoj plej malvarmaj, ĝi malvarmiĝas kaj tiam malpliĝas ĝia kapablo por retenigi vaporon de akvo. Poste ĝi kondensiĝas en nuboj formitaj de milionoj da gutetoj de akvo aŭ da kristaloj de glacio. De tempo al tempo la akvo elfalas pluvforme, kies pli granda parto estas revenita al la oceanoj, de kie ĝi devenas.

Tradukita de Paqui Corrales el la revuo "Integral".



# Kunlaboraĵoj

## LA GAMETOJ KAJ LA FEKUNDIGO

(Dua Parto)

### La fekundigo kaj la granda kuro de spermatozooj

Spermatozoo kaj ovolo estas ĉeloj formitaj de de du individuoj (de malsamaj seksoj aŭ hermafroditoj). Ĉe renkontiĝo, ĉi du ĉeloj kapablas kunfandiĝi en nur unu: la ovo. Se spermatozoo renkontas maturan ovolon, ĝi penetras en ties internon; ĝenerale, ĉe l'eniro ĝi forlasas sian flagelon; tiu penetro de la spermatozoo en la ovolon kaj l'okazaĵoj tion sekvantaj konsistigas la fekundiĝon.

Ĉiu gameto (spermatozoo kaj ovolo) posedas nukleon kiel ĉiuj ĉeloj. La nukleo de ovolo ĝenerale estas tre malgranda kompare kun la ovolo mem, dum tamen la nukleo de spermatozoo konsistigas du trionojn de ties "korpo". Kiam la nukleo de la spermatozoo penetras en la ovolon, ĉi tiu iĝas, tiam, du-nuklea ĉelo. Sed tiu anomalia ne daŭras longe, ĉar tuj poste la du nukleoj kuniĝas kaj miksiĝas por formi nur unu. La ensemblo ovolo plus spermatozoo fariĝis ununura ĉelo: la ovolo. Plej ofte, la ovo restas en tia stato treege mallonge. Rapide, ĝi ekdividiĝas por formi du ĉelojn, tuj kvar, tuj ok, poste, post pluraj dividoj, aperas embrio. Tiu embrio fariĝos nova individuo de la sama specio kiel siaj gepatroj, kiuj liveris la spermatozoon kaj la ovolon.

Ĝis nun ni parolis nur pri unu spermatozoo kaj unu ovolo. Fakte, unu maturan ovolon ĉirkaŭas ĉiam miloj da spermatozooj. El inter tiuj miloj da kandidatoj por fekundigo, kiuj klopodas penetri la ovolon, nur unu atingos tion kaj, tuj poste, la ovola surfaco fermiĝos por eviti, ke la ceteraj eniros. La selektadon de "venkinto" foje faciligas la ekzisto de "deviga pasejo" en la surfaco de l'ovolo: tiu el truto posedas, ekzemple, etan aperturon, kiun devas trapasi la spermatozoo por atingi la eblo penetri en la ovolon. Ĉiuj, kiuj ne trovas tiun sekretan pasejon, destiniĝas pereji sen posteuloj.

En ĉiuj kazoj, el ĉiuj milionoj da spermatozooj, nur kelkaj atingas fekundigi, la ceteraj mortas en ega fatraso el vivanta materio.

La fekundigo estas tute miriga fenomeno. Antaŭ ĉio, ĝi troviĝas en la tuta sekse, vivanta mondo: de la bakterioj ĝis la homo, tra la algoj, bananoj, insektoj kaj birdoj. Krom ĉe tre malgrandaj, simplaj estaĵoj, la transigo de l' vivo de iu generacio al la sekvanta bezonas ĉiam la renkontoĝon de du gametoj kaj la postan fekundigon. Ĉiu individuo, kiel ajn granda ĝi estu, komenciĝas de ovo: baleno tridek metrojn longa, elefanto kvin tunojn peza, aŭ sekvojo (amerika arbo, kiu povas atingi cent metrojn alten), ĉiuj komenciĝas de malgranda ovo kun diametro malpli-ol-unu-milimetra kaj konsistanta el nur unu ĉelo. Jen do la venĝo de la ĉelo, tio estas, de la plej simpla vivmaniero: ĉiu estaĵo, kiel ajn granda kaj kompleksa ĝi estu, komenciĝas de ovo, kiu ŝajnas tiel simpla kiel infuzorio kaj apenaŭ pli komplika ol vulgara mikrobo.

	ANIMALO	SPERMATOZOO
Baleno	50 metroj	40 mikronoj
Homo	1'70 metroj	53 mikronoj
Hamstro	15 centimetroj	250 mikronoj
Krustulo ostrakodo	700 mikronoj	1200 mikronoj

Kompara longo de diversaj animaloj kaj de iliaj respektivaj spermatozooj; (unu mikrono = unu milono de milimetro)

Tradukis: Cristina Tirado Narváez

Korekto: En la unua numero de ĉi tiu jaro, en la Kunlaboraja paĝo ni skribis "Cristina López". Bonvolu legi "Cristina Tirado"

# Granda Frateco Universal

STATUTOJ DE LA FONDAĴO "GRANDA FRATECO UNIVERSALA", G.F.U.,  
FONDAĴO DE DR. SERGE RAYNAUD DE LA FERRIERE

-- ĈAPITRO 1 --

-- INSTITUCIO --

ARTIKOLO 1a. -- Granda Frateco Universal, G.F.U., Fondaĵo de Dr. Serge Raynaud de la Ferriere. Ĝia mallongigo estas G.F.U., estas institucio kun karakterizoj de privata kultura Fondaĵo.

ARTIKOLO 2a. -- Granda Frateco Universal, G.F.U., Fondaĵo de Dr. Serge Raynaud de la Ferriere, havas propran juran personecon kaj plenan de jura kaj agada povo, sen aliaj limigoj ol tiuj, kiuj estas starigataj de la leĝoj kaj de ĉi tiuj statutoj.

ARTIKOLO 3a. -- La plenumo de la fondaĵaj celoj, kaj ĉio, kio rilatas al tiuj, estas fidata al sia Plenuma Konsilantaro, sen iu limigo rilate ties agadon, respektante tion, kio estas antaŭvidita ĉe la antaŭaj statutoj kaj tion, kio estas ordonata ĝenerale kaj devige, ĉe la leĝaj aplikeblaj normoj kaj tre precipe rilate la prezentadon de la jara raporto kaj la likvidon de ĉiu ekonomia administratempo.

ARTIKOLO 4a. -- Granda Frateco Universal, G.F.U., Fondaĵo de Dr. Serge Raynaud de la Ferriere baziĝas tute sur la literatura, kultura kaj scienca verkado de la elstara franca klerulo Dr. Serge Raynaud de la Ferriere, fondinto de Granda Frateco Universal, tutmonda kultura institucio kies sidejo troviĝas en Karakaso, Venezuela Respubliko.

La literaturaj verkoj de Dr. Serge Raynaud de la Ferriere kaj precipe liaj "Cirkuleraĵoj Leteroj" konsistigos ĉiukaze la referencan ideologian kadron kiun oni ŝatu kiel bazo por la funkcio kaj solvo de kia ajn dubon eble okazonta en la irado de ĉi tiu Fondaĵo.

(daŭrigota)

# AMUZAĴOJ

LOGIKAJ DIVENAĴOJ LOGIKAJ DIVENAĴOJ LOGIKAJ DIVENAĴOJ

- Du moneroj sumas 30 pesetoj sed, tamen, unu el ili ne estas duro. Kiaj moneroj estas?
- Trajno eliras el Boston al NovJorko. Unu horon poste, alia trajno eliras el NovJorko al Boston. La du trajnoj iras je la sama rapido. Kiu el ili estas pli proksima de Boston kiam la du renkontiĝas?
- Kio estas pli bona?  
Kio estas pli bona, ĉu la eterna feliĉo aŭ ŝinka sandviĉo?  
Povus ŝajni, ke la eterna feliĉo estas pli bona. Sed tute ne!  
Ĉar nenio estas pli bona ol la eterna feliĉo kaj ŝinka sandviĉo estas certe, pli bona ol nenio. Do, ŝinka sandviĉo estas pli bona ol la eterna feliĉo.

El la libro "Kiel Nomiĝas Tiu Libro?" de Raymond Smullyan

Jen la solvoj de la du unuaj enigmoj:

Unua problemo: La solvo estas unu moneŭro de 25 pesetoj kaj unu de kvin pesetoj, kaj ja unu el ili ne estas duro.

Dua problemo: Kompreneble, la du estas je la sama distanco for de Boston ĉar, kiam ili renkontiĝas, la du estas en la sama loko.

Kaj jen la solvo de la pasinta ĉevalpaŝenigmo:

Oni diras, ke venas sur Teron  
la feinoj por ama konsol'.

Mi suferas pro am' kaj neniam  
ili venis al mi kun parol'.

Inglada Ors.

ĜIS!